

# esperanto USA

1992(4)

The ELNA Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

## Making News This Issue

### Vladivostok

In May a group of 80 Esperantists from China, Japan, Korea and Russia braved the dangers of a city which had just been wracked by the explosion of a naval arsenal to discuss trans-Pacific language, culture and cooperation. Here is a report.

See Page 7

### Testimonials

Those who have studied Esperanto all have their opinions about the language and the uses to which it can and should be put. Cathy Schulze provides us with some of these opinions in this issue.

See Page 8

### Youth

If you're under 27 (or even just a little bit older), you'll want to read the message of Dave Gaines, ELNA's new Commissioner for Youth Affairs.

See Page 13

### In This Issue:

Two Full Pages of Announcements 5-6

The Board at Work 9

Language in the News 12

And Much, Much More to  
Delight and Inform You!

## ELNA Congress '92

## WISH YOU WERE THERE...

by Don Harlow

Esperanto congresses generally fall into two categories: "mass manifestations" and "homey, family-atmosphere get-togethers." These two terms may be translated more succinctly as "large" and "small." This year's World Congress in Vienna, with over 3,000 participants expected, was a "mass manifestation"; ELNA's 40th anniversary congress, with around 60 attending, was a "family get-together."

Nonetheless, it was, in my opinion and from the part of it that I saw during those hours when I wasn't earning a living, eminently successful.

First and foremost, this was perhaps the most "international" congress ELNA has had in a long while. We had participants not only from the United States, but also from Costa Rica, Cuba, Hungary, Israel, Japan, Mexico, and Poland. Well, I could also add China and Romania to this list, but Chien Ming-chi and Ionel Onet are today really a part of the local scene...

Second, this congress, to some degree following the lead of last year's congress in Raleigh, had a vital and interesting program. I couldn't catch all of it, but really enjoyed the Esperantic Studies Foundation's panel on Esperanto in education (Steve Belant of Sacramento has a transcript of this and a similar though not identical panel at San Francisco State, for those who are interested) and Don Coleman's presentation on local clubs and what we can expect to see in the forthcoming handbook for local Esperanto groups. I myself led a discussion on the newsletter, and participated in a panel on the question of language in the New World Order (what *is* the New World Order, anyway?) along with Cynthia Libby of the Baha'i community and Fred Duperrault, President of the Northern California branch of the World Federalists. And I also got to attend, for the very first time,

Bill Harmon's reception for UEA delegates, where wine and conversation both flowed freely and melliflously.

Third, the excursions were popular and successful, especially the all-day trip to the wine country of Napa north of the Bay Area.

Fourth, work was done. The Estraro met in their own room, free of distractions, for a sum total of more than twelve hours, and cleared up a number of problems. Earth-shaking decisions were generally not a feature of this year's congress, but there were a few notable points. From my point of view, most important was the decision to continue modernizing the Central Office; during the next few months, it will be getting a fax line, a laser printer, and a modem and on-line account. Times have certainly changed since the Good Old Days when I kept the books in a five-pound ledger with a quill pen (it was actually a ball-point, but it *felt* like a quill pen).

Fifth, I got to hear lots of little tidbits of information. Most interesting of these was in David Wolff's report on ELNA's publishing activity; it now appears that Peter Benson's *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* will actually be available sometime before next summer!

Sixth, there are new faces on the Estraro. Ellen Eddy returns, this time in a new role (officially new—but she's done the actual work in the past, as a voluntary service): that of Secretary. And three entirely new names are those of Thomas Eccardt, President of the Esperanto Society of New York; D. Gary Grady, one of those who was responsible for last year's very successful Raleigh congress; and Rochelle Grossman, who keeps UEA's New York office going.

And seventh and last... a good time was had by all. Except you, if you weren't there.

But then there's always next year.

# EDITORIAL

## TWO COLUMNS IN THREE

Of the numerous columns in *Esperanto U.S.A.* that I have introduced in the years since I became editor, I'd like to comment on, and explain a bit of the philosophy behind, two of them. These are "Letters" and "Language in the News."

A decade and a half ago I had occasion to buy most of a complete set of newsletters that were published in the late sixties and early seventies by one of the esoteric religious groups that sprang up in the "counterculture" of that period. About the group in question, I will here say only that it was based on the "Martian" religious ideas proposed by Robert A. Heinlein in his popular novel *Stranger in a Strange Land*. The various articles in the newsletter were not of any particular interest; what attracted my attention was the multifaceted and extremely thought-provoking letter column. The editor made it his policy to publish just about anything, from just about anybody, and the result was a fascinating exercise in the exchange of ideas.

At some point, the editor decided to pack his family in their van and move from the Midwest to the green fields of California, leaving the newsletter in the hands of a new editor with different ideas about the relative importance of a letter column. If I remember correctly, it folded after about three more issues.

When I became editor of *The ELNA Newsletter*, now and henceforth *Esperanto U.S.A.*, I decided that I would do whatever I could to bring a similar letter column to our magazine. The results speak for themselves; in the six issues of fiscal 1992, a total of 92 pages, more than 15 pages were devoted to letters—a new record.

I had another, and more philosophical, reason for promoting the letter column. Historically, EUSA, like many other newsletters, has existed primarily as a means for communicating to the dues-paying "rank and file" of ELNA what the "movers and shakers" are doing to promote Esperanto. My own philosophy is that the newsletter should also serve as a forum for the exchange of ideas among ELNA's members, as well as others (potential members!) with an interest in Es-

peranto. The ultimate goal, of course, is to draw many Esperanto speakers who would otherwise remain passive users into active participation in the Esperanto-speaking community.

There are, of course, problems with a "free speech forum." Some, perhaps most, members feel that, within the context of the newsletter, there should be limits, albeit very broad ones, on what material should be allowed to appear. I share this feeling, and there are a few topics on which I simply won't waste space in the letter column. If you have discovered that in 1907 somebody tried to reform Esperanto, and came up with Ido, a more "Westernized" variant of our language, and if you want to promote Ido instead of Esperanto—well, there are other forums in the world more appropriate for that (though not many of them...). If you want to push structural "reforms" of Esperanto, as opposed to such purely cosmetic additions as a "masculine" suffix, 105 years have shown that this is a peculiarly fruitless exercise. If you don't like some other member of ELNA—or any other member of ELNA, for that matter—the newsletter is not the place to express your personal dislikes.

On the other hand, I am willing to entertain just about any other sort of expression of opinion that relates to Esperanto, the Esperanto movement, or the language problem. If you don't like some particular one of ELNA's policies, you certainly have a right to express that opinion. If some aspect of the movement bothers you, you don't have to remain loyally silent. And if you disagree with somebody else's expressed opinion, you have the right, perhaps the duty, to express that disagreement in print.

But whatever you choose to say, I'd rather publish it than not. I am, after all, an editor, not a censor.

A more recent innovation is "Language In the News." This is an attempt to live up to the other part of our masthead: "News of the Language Problem." And, as you can see by following this column, there is indeed a problem. Or, more correctly, dozens or hundreds of different problems, all lumped together under that

single, all-encompassing rubric "the language problem."

Many of you have sent me language news notes; they seem to breed like flies! I myself have found a number of interesting items on the pages of our local newspaper.

I don't use all of these notes—there simply isn't enough space, and the topic is simply not all that important, comparatively speaking! Let me here admit that I did reject one otherwise interesting newsnote (on the study of English in Czechoslovakia) simply because the disgruntled reader who sent it to me included a note to the effect that "I'll bet you won't publish this!" and so I didn't...

Richard Earnhart, ELNA member from Denton, Texas, in response to two short articles on the use of patois rather than standard English in Jamaica and the shift in the Nigerian educational system from English to local languages, asked me what all this has to do with Esperanto. The answer is that there is no direct relationship between, for instance, the introduction of Hausa into the schools of northern Nigeria and the promotion of Esperanto as the world interlanguage. But I should again remind those who have forgotten that this newsletter's charter is to discuss not only Esperanto but also the so-called language problem; and the reason for this is that it is precisely this problem that justifies the existence of Esperanto, and our promotion of the language. It is far too easy for us to look complacently around us, at our comfortable suburban neighborhoods where just about everybody speaks English, and conclude that there really is no language problem, and therefore no need for Esperanto. "Language in the News" is intended to keep ELNA members reminded that, in fact, on a world and even a national scale, such a problem does exist.

I should also add that several of the items in the column add a degree of humor to the magazine. If "Language in the News" served no other purpose than that, I think its existence would be justified.

Don Harlow

# NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

The editor of the comic collector's magazine *The Classics Collector* (Dec. 1991) describes speaking to the Esperanto courses at San Francisco State University, and also explains the source of art used in Hungarian Esperanto comics. The cover displays a picture of Esperantist Reginald Jaderstrom at SFSU. (sent by Reg Jaderstrom)

In a very objective article, *The Catholic Herald* (Jan. 16, 1992) reports that the Vatican has approved the translation of the Mass into Esperanto. The article describes something of Esperanto's history and structure, and quotes from Carlo Sarandrea, co-director of Vatican Radio's Esperanto section. (sent by Emma M. Jungton)

On *Night Line* (Feb. 17, 1992), commenting on the panel of candidates for the U.S. presidency, commentator Ted Koppel said they were "so earnest one almost expected a question on the metric system or Esperanto." (reported by Cathy Schulze in *Sferilo*, June 1992)

*The American Poetry Review* (Jan./Feb., 1991) includes an ad for Guernica, a Canadian book company, which contains the word "Kulturkrucado," which it then explains as "In Esperanto: the crossing of cultures." (from Cornelius J. McKown)

"Home-Grown Grandmasters" by Peter Maass, in the Washington, DC, *Post* (Mar. 11, 1992) is dedicated to the Polgar family of Hungary, father Laszlo Polgar's educational theories, and the astonishing chess feats of daughters Zsuzsa, Zsofia and Judit. The article mentions that Zsuzsa speaks Esperanto, but not that the other members of the family do as well. (sent by E. James Lieberman)

Ruth Ellen Gruber, in a feature article "The Haunting" on Poland's eastern borderlands and the area around Bialystok in the Chicago *Tribune Magazine* (March 22, 1992), devotes six paragraphs to L. L. Zamenhof and Esperanto. (sent by Bern Wheel)

Among twelve recipients of the respected Kohl International Teaching

Awards in Chicago this year is Adrienne LeDree, who teaches mentally disabled students at Carver Middle School. According to the Chicago, IL, *Tribune* (Mar 25, 1992), "LeDree uses mirrors and camcorders to teach autistic students to speak, to use sign language and to converse in Esperanto, an international language based on Latin roots with words from other European languages and spoken by at least 2 million people in 83 countries." (sent by R. Kent Jones)

"Esperanto is a language full of the future tense," says AP writer Brian Murphy in an article in the Seattle, WA, *Post-Intelligencer* (Apr. 1, 1992). This multi-column article includes quotes from UEA Chief Delegate William Harmon, director of UEA's New York office Rochelle Grossman, Professor Chin-Chuan Chang of the University of Illinois, and University of Hartford President Humphrey Tonkin. (article sent by Sidney Culbert; also submitted from other newspapers by Cornelius McKown and John Victory; also posted to esperanto@rand.org by Thom Monticue)

Our anonymous reporter, while standing in a supermarket checkout line and investigating an article about a lady with a 73-inch bust in *The Sun* (Apr. 7, 1992), found another article about the American Bible Society, which mentions, among other Bibles held by the Society, "one in Esperanto, an artificial language." (provided anonymously)

"Esperanto" is the descriptive title of a large article in the McAllen, TX, *Monitor* (Apr. 11, 1992). The article by Avrel Seale, which takes up most of the front page of section D as well as two columns inside, describes the lifetime activity of UEA Delegate and former ELNA President Armin F. Doneis for the language described in the article as "the mother tongue of world brotherhood." The front page includes a color photo of s-ano Doneis and two sidebars, "About Esperanto" and "You try it." (sent by Armin Doneis)

FM station CJCA of Edmonton, Alberta, Canada, (May 21, 1992) carried a twenty-minutes live interview about Espe-

ranto with Prof. Humphrey Tonkin, President of the University of Hartford, CT, and former President of the Universala Esperanto-Asocio. (information from Humphrey Tonkin)

Robert Kelly's "Academy Students Learn 100-Year-Old Language" in the St. Louis, MO, *Post-Dispatch* (May 25, 1992) is an excellent article about the Esperanto course taught by Prof. Ronald Glossop at the A.M. Jackson Math and Science Academy in East St. Louis. The article includes descriptions of the structure and history of the language, and adds that the teacher responsible for the students who are studying Esperanto, Alan Magarian, "said he would recommend that the Esperanto classes continue this fall. The Esperanto program 'appears to have been reasonably successful'." (sent by Ron Glossop)

Henry Wiencek, in a *Smithsonian* (May, 1992) article "Laying out the idyllic life in a latter-day Arden" about Arden, DE, mentions that among the "people of ideas" who have been its citizens were promoters of Esperanto. (sent by Arlyn Kerr)

Esperanto was mentioned on KTVU—Channel 2, Oakland, CA (June 4, 1992) on the program "News at 10," in relation to the UNCED "Earth Summit" in Brazil. This was as part of a short interview with an Esperanto teacher, apparently from England or Australia. (reported by Ionel Onet)

*Knight Letter*, the quarterly report of The Lewis Carroll Society of North America (Spring, 1992), devotes much space to a description of a presentation by Dr. William F. Orr of the nonsense poetry of Lewis Carroll in Esperanto. Dr. Orr introduced the members not only to the poems from *Alice in Wonderland* that appeared in the 1910 Kearney translation, but also to Marjorie Boulton's translation of *Jabberwocky* and William Auld's translations of *A Mad Tea-Party* and *The Mock Turtle's Story*. (sent by Margaret Barkley)

Olaf Egeberg, in his book *Right Now*, describes Esperanto as a global language, and gives the address of the Universala Esperanto-Asocio. (provided by the ELNA Central Office)

A recent Damark catalog advertises yet another pocket electronic translator, from SelecTronics; this one includes Esperanto as one of its 26 languages. (noted by Jack Wright and E. James Lieberman)



# REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

## ARIZONA

La 28an de marto okazis ĉe A.I.P.E.R.-domo en Tempe la unua tutŝtata Esperanto-Konferenco. Gastigite de Arizona Stelo, reprezentantoj de sep urboj arizonaj, novmeksikaj kaj arkansasaj ĉeestis la konferencon: dek geesperantistoj kaj du familianoj siaj. Parolantoj enkludis: Attila Magyar pri vojaĝo al Eŭropo; Jay Kamchi de la A.S.U. Esperanto-Klubo pri la historio de la studenta lingva societo; Ron Harvey pri la senpaga perkomputila E-poŝta kurso; Bill Shanks pri la UK en Bergen; Elisabeth Hicken pri korespondado en Esperanto; Ed Grobe pri la parolado de Prof. Ron Glossop pri lingva studado kaj tutmanda klerigado; kaj Angelina Taremi pri sia vojaĝado tra aziaj, eŭropaj kaj amerikaj Esperanto-komunumoj. (resumeto de raporto en *Arizona Stelo*, aprilo 1992)

“Duncan estas malgranda urbeto apud la Novmeksikia landlimo. Mi estas la ununura esperantist(in)o en Duncan. Mi volis paroli kun samideanoj. Tiam, venis al mia menso la penso, ke eble la baza kurso interesos la 4-H-gejunulojn. Mi demandis de la kantona agento, ĉu tia projekto estas konvena. Ŝi respondis jese. Do, mi ĉeestis la monatan kunvenon kaj demandis, kiu volas lerni Esperanton. Kvin gejunuloj respondis! Ni havis jam tri lecionojn kaj ili daŭre volas lerni. Kaj nun, ankoraŭ unu knabino kuniĝis, pligrandigante la kvanton ĝis ses. Iliaj aĝoj varias de 7 al 11 jaroj. Iliaj nomoj estas Calvin Lunt, Meghan Lunt, Camilee Payne, Jamie Rapier, Ky Sanders, kaj Lexa Sanders. Ili diras, ke ili ŝatas Esperanton ĉar ĝi estas ‘amuza’, ‘celstariga’ kaj ‘entuziasmiga’. Iuj deziras kunkorepondantojn kiam ili finos la kurson.” (raportis Debbie Hileman en *Arizona Stelo*, majo 1992) **Wm. Shanks, Esperanto Society of Arizona, 1345 W. Escarp, Mesa, AZ 85201.**

## CALIFORNIA

La 14an de decembro 1991, dek sep personoj ĉeestis en ĉina restoracio en Pasadena, kun gastoj Cida Tuon el San

Paulo kaj Ed Ledzinski el Washington DC, por la jara Zamenhofa Bankedo de la Esperanto-Asocio de Los Angeles. Post la bankedo, ĉe la kutima programejo, Forrest Ackerman, konata verkisto de scienc-fikcio, rilatis amuzan historion pri sia vojaĝo en Ĉeĥoslovakio. **Esperanto Association of Los Angeles, 1112-7th St. #811, Santa Monica, CA 90403.**

La 23an de aprilo, en la urbo San Mateo, Cathy Schulze paroladis pri la spertoj de geduoj, kiuj kuniĝis pere de Esperanto. Ĉar multaj denaskaj esperantistoj naskiĝas pro tiaj geedziĝoj, ŝi muzikis la Brahmsan kaj Israelan lulkantojn en Esperanta formo, kantatajn de la franca muzikistino, Nikolin’, sur kasedo de lulkantoj el multaj landoj. (raportis Cathy Schulze en *Sferilo*, junio 1992) **San Francisco Esperanto Regional Organization, 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010, tel. (415) 342-1796.**

La Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj okazigis la 14an Senkrokodiligan Semajnfino ĉe la YMCA Point Bonita, Marin Headlands, norde de San Francisco. Oni diskutis i.a. la eblecon aperigi komputile generitan vortaron, la baldaŭ okazontan ELNA-kongreson, kaj la temojn traktitajn ĉe la lastatempa Tutkalfornia Esperanto-Konferenco. Partoprenis kelkaj novaj esperantistoj, inter kiuj estis diplomitoj de speciala Esperanto-kurso ĉe la kompanio Telebit en Sunnyvale. (laŭ raporto en *La Orient-Ekspreso*, majo 1992) **Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj, P.O. Box 324, Berkeley CA 94701-0324.**

## DISTRICT OF COLUMBIA

Kelkaj anoj de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono partoprenis la Duan Kunvokiĝon pri Tutmondaj Strukturoj (Second Global Structures Convocation) ĉe la Hotelo Marriott en Vaŝingtono, la 6an ĝis la 9a de februaro. La kunvenon aŭspiciis aro da internacie pensantaj organizoj, enklude ELNAn, kaj ĝi diskutis temojn rilatajn al internacia daŭrigebla evoluigado, la medio, paco kaj monda registaro. Joan Gildemeister partoprenis multajn seminariojn, kaj Jim

Lieberman, Martha Flores, Tom Goldman kaj Tim Ryan deĵoris ĉe Esperanto-tablo, kiu allogis multajn informpetantojn. Laablo situis transangule de tiu de la World Service Authority, kiu eldonas tutmondajn pasportojn kaj aliajn dokumentojn pro la kredo, ke oni instigu al homoj disvolvi sennaciismajn identecojn. WSA fondinto Garry Davis ĉeestis, kaj li montris al la esperantistoj tutmondajn pasportojn, kiuj estas skribitaj en Esperanto krom aliaj lingvoj. (el *La Potomaka Esperantisto*, majo 1992) **Esperanto-Societo de Washington, P.O. Box 13523, Silver Spring MD 20911.**


## ILLINOIS

Laŭ R. Kent Jones, Sekretario de la Esperanto-Societo de Chicago, nuntempe okazas almenaŭ dek klasoj de Esperanto en la regiono de tiu metropolo. La Societa Prezidanto Tony Gravagno taksas, ke 70 lernantoj enestas en tiuj klasoj. Tiuj klasoj enkludas ankaŭ la oficialajn kursojn por geknaboj en la lernejoj Alcott School, Carver Middle School, kaj Joplin School. (laŭ raporto en *Saluton*, majo 1992)

Tony Gravagno, Prezidanto de la Esperanto-Societo de Chicago, parolis pri Esperanto du fojojn vendrede la 28an de februaro. Unu fojo estis en ĉikaga radiostacio WLS je la 7a atm. kaj la alia en WBEZ (publika radio) FM je la 11a atm. La unua estis tia programo, en kiu oni respondas al demandoj. En la dua, lin kontraŭis profesoro, kiu bagateligis Esperanton kiel lingvon, ŝajne apenaŭ sciante ion pri ĝi. La Societo ricevis 20-30 informpetojn surbaze de tiuj programoj. (raportita en *Saluton*, majo 1992)

Malsame ol multaj publikaj bibliotekoj, tiu de Chicago posedas sufiĉe ampleksan Esperanto-kolekton — preskaŭ duonbreton en la referenca sekcio kaj preskaŭ du bretojn en la cirkulanta kolekto; en la lasta parto troviĝas kelkaj binditaj volumoj de la revuoj *esperanto* kaj *El Popola Ĉinio*. La Direktoro de la Fremdlingva Sekcio, William McElwain, estas ankaŭ membro de la Esperanto-Societo de Chicago. (raportis *Saluton*,

**Daŭrigota sur paĝo 13**



# ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

**La Informilo por Interlingvistoj (Ipl)**, eldonita de CED, reaperos sub redakto de d-ro Detlev Blanke. De ĝi dankinde redaktis 21 kajerojn (1983-1990) Ryszard Rokicki. Ipl celas peri informojn pri la plej gravaj interlingvistikaj aranĝoj, publicaĵoj, iniciatoj kaj planoj. Ĝi aperos laŭbezone kaj en modestaspekta formo. Interesiĝantoj mendu ĝin ĉe UEA. Kontribuantoj skribu al la redaktoro: **D-ro Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, D-O-1141 BERLIN, Germanio.**

Ni ŝatas ludi **Mozart-simfonion dum la UK** en Vieno kaj serĉas ankoraŭ orkestranojn: ĉefe violonojn, aldojn, kaj violonĉelojn, krome traversflutojn, hobojojn, klarinetojn, fagotojn. Skribu al: Internacia orkestro ĉe **Thomas Kleemann, Bahnhofstr. 95, D-W-6904 EPPELHEIM, Germanio.**

**La Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio** anoncas, ke ĝi nun havas konstantan sidejon, kaj proponas por la membroj de ELNA turismajn eblecojn en Varsovio—pli ol dudek aktivuloj finis kurson de ekskurs-gvidantoj. Kunaganta Esperanta firmao VETURI proponas al ĉiuj interesuloj komercan kunlaboron, reprezentadon en Pollando, plifaciligon de kontaktoj kun polaj firmaoj. Adreso: **Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio, ul. Gen. Andersa 37 m 59A, PL 00-159 VARSOVIO, Pollando, tel. (48 22) 314095.**

Jus aperis la **1992-eldono de Pasporta Servo**. En la ĉijara listo aperas preskaŭ 900 adresoj de gastigantoj en 59 landoj, homoj pretaj akcepti vojaĝantajn Esperanto-parolantojn. Oni povas mendi la katalogon kontraŭ 21,30 nederlandaj guldenoj (pli-malpli \$13.00), enklude sendkoston, de: **Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-**

**3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando.** Se vi volas aliĝi al Pasporta Servo kiel gastiganto, la kontaktadreso estas: **Pasporta Servo, p/a Rob Keetlaer, Postbus 2310, NL-1000 CH AMSTERDAM, Nederlando.**

Esperantistoj de SEJM proponas la **33an Sovetujan Esperantistan Junularan Tendaron (OkSEJT)** apud Sankt-Peterburgo la 2an de julio ĝis la 12a de julio, 1992. Ĉeestos la rokgrupo Amplifiki. Mankos veraj tendoj, sed estos je dispono de la partoprenantoj 2-3-litaj ĉambroj, diversaj haloj, kafejoj, dancejo, k.c. La tendarejo situas en bela loko—inter rusiaj arbaroj, 130 km sudoriente de Sankt-Peterburgo. Aliĝkotizo estas 30 DM (pli-malpli \$18) kaj restadkosto estas 60 DM (gejunuloj ĝis 30-jaraj) aŭ 110 DM (aliaj). Por informo: **SEJM, P.O. Box 111, 143000 ODINCOVO-6, Moskovskaja obl., Rusio.**

Ankaŭ ĉe Tomsk okazos **OrientSiberia Esperanta Junulara Tendaro (OrSEJT)** en la dua duono de julio. Kosto estos ne pli ol \$30-35, pagebla surloke (ne sendu anticipel!). La tendaro daŭros 12 tagojn. Oni aranĝas pitoreskan lokon, ligno-fajrajn vesperojn, sendomajn noktojn (por dezirantoj), kaj varian programon. En la tendaro funkcios tendara radioamatora stacio RW9HWR, oni planas okazigi TERA-3 (renkontiĝon de radioamatoroj), estas planata Instrurajta ekzameno—dezirantoj kaptu la okazon en Siberio! Por informoj ktp: **Tomsk Esperanto-Klubo, 634055 TOMSK-55, Box 2289, Rusio.**

Laŭ plurjara tradicio, la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj nun planas okazigi la **15an Nordkalifornian Senkrokodiligan Semajnfinojn** je la 6a ĝis la 8a de novembro. La Semajnfino okazos en la YMCA Point Bonita sur la Terkapo Marin norde de San Francisco en norda Kalifornio, en supermara kaj iom sovaĝeca etoso apud la Pacifika Oceano. Informojn pri la kosto oni povas ricevi de LOGE, sed supozeble ĝi estos pli-malpli \$70 por aliĝkotizo, dunokta restado, kaj kvar manĝoj en la bonega

manĝejo de la YMCA. Por informoj: **LOGE, P.O. Box 324, BERKELEY CA 94701, Usono.**

Inter la 11a kaj 13a de septembro okazos en Sacramento la **Konferenco "Global California '92"** kiun aranĝas la Asocio de Unuiĝintaj Nacioj kaj kiuj kunaŭspicias ankaŭ ELNA. Kosto estos \$65 por partoprenantoj, plus ekstraĵo por bankedo. Por informoj/aliĝiloj: **UNA-USA Sacramento, 1910 P Street, Sacramento CA 95814.**

Kvankam la **Internacia Humanisma kaj Etika Unuiĝo** ankoraŭ pliparte plenumas siajn taskojn en la angla lingvo (ĝia trimonata revuo *International Humanist* aperas en la angla), ĝi nun komencas reklami por membroj ankaŭ en Esperanto. Informa pamfleto kaj aliĝilo en Esperanto estas haveblaj de: **IHEU, Sekretariejo, Oudkerkhof 11, NL-3512 GH UTRECHT, Nederlando.**

Se vi deziras trovi **negoc-partnerojn kaj establi komercan kunlaboron pere de Esperanto kun firmaoj kaj entreprenoj en Respubliko Uzbekistano kaj Meza Azio** (en plej diversaj sferoj kiel fondo de miksitaj entreprenoj, internacia turismo, importo, eksporto ktp) turnu vin kun viaj ideoj kaj proponoj al: **Firmao "Oriente", P.K. 76, 703000 SAMARKANDO, Respubliko Uzbekistano, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj.**

**La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco** enhavas 15 000 ekspoziciaĵojn de 100 landoj, pritraktantajn la universalajn homajn valorojn kaj la plej gravajn mondproblemojn, kiujn nuntempe frontas la homaro. Vi povas aliĝi, proponante vian helpon laŭ via kapablo. Bonvolu kontakti: **Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco, P.O. Kesto 76, 703000 SAMARKANDO, Respubliko Uzbekistano, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj.**

Ĉu vi serĉas **korespondamikojn en Centra Azio**? Sendu leteron kun informoj pri vi al: **Internacia Amikeco-Klubo "Esperanto", P.O. Kesto 76, 703000 SAMARKANDO, Respubliko Uzbekistano, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj.**

Post tre sukcesa Eŭropo-Azio '91 kun 100 partoprenantoj el Finnlando,



Germanio, Koreio, Litovio, Nederlando kaj pluraj eks-sovetiaj respublikoj, Ruslanda Esperanto-Asocio invitas eŭropajn, aziajn kaj alikontinentajn esperantistojn al Eŭropo-Azio '92: La Rusa Vintro en Jekaterinburg inter la 29a de decembro 1992 kaj la 5a de januaro 1993. Por informoj kaj aliĝilo: Eŭropo-Azio '92, 620077 JEKATERINBURG-77, ab.ja. 67, Ruslando, tel. (7 3432) 470797, telefakso (7 3432) 514707 ATT MARAT.

En Rusio nun aperas, aparte por orienteŭropanoj kaj civitanoj de eksa Sovetunio, nova revuo por komencantoj de Esperanto kun la taŭga nomo *Komencanto*. Ĝi aperas en ses numeroj jare, du grandformataj (Heroldoformataj) paĝoj en ĉiu numero. Abono por usonanoj estas \$6.00 jare. Por informoj aŭ abonoj kontaktu la usonan peranton: Miĥaelo Larkin, 3904 Beadle Lake Dr., Battle Creek MI 49017-8214, Usono, tel. (1 616) 962-7356.

Esperantotur en Pollando ĵus eldonis novan libreton *Kongresistikaj Notoj* de konata kongresisto Gian Carlo Fighiera. La libro ampleksas 46+12 paĝojn, kaj temas pri la scienco okazigi kongresojn. Ĝi estas havebla kontraŭ 10 internaciaj respondokuponoj aŭ egala valoro de: Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 BYDGOSZCZ Pollando, telefono (48 52) 415744, telefakso (48 52) 415115, telekso 562840 ETUR PL.

La Instituto Berzsényi Daniel en Hungario instruas Esperanton al la plimulto de la studentaro. Nun ili bezonas librojn en Esperanto por sia libraro. Kiuj povas helpi, bonvolu kontakti: Katalin Smideliusz, p/a Karolyi Gaspar ter. 4, Pf.: 170, H-9701 SZOMBATHELY, telefono (36 94) 13-892, telefakso: (36 94) 12-248, telekso: 37-241 TANFSZ. H.

Vi lernis Esperanton por intimiĝi kun aliaj mondanoj. Malfeliĉe, vi ne scias kiel tion realigi. Ekster la kongresoj, vi ne scias kion fari por ligi firmajn kontaktojn kun alilandaj samideanoj. L' Amikeca Reto estas organizo, kies celo estas ebligi ĉiaspacajn amikecajn rilatojn.

Ĝi celas fundajn neordinarajn vizitojn, nekutimajn aktivadojn aŭ diskutojn. L' Amikeca Reto iras tien, kien la ordinara turistoj ne iras mem, ĉar mankas al ili la lingvo de la amikeco, Esperanto... La gvidlibro 1992-1993 haveblas, kontraŭ 50 francaj frankoj aŭ ekvivalento (aŭ 15 IRK) de: Amikeca Reto, 88 rue Victor Hugo, F-37 400 AMBOISE, Francio.

La kultur-komerca centro "Esperanto" estas multbranĉa privata entrepreno, strebante kiel eble plej vaste uzi Esperanton en sia laboro. Oni pretas fondi komunajn entreprenojn, kunlabori, reprezenti interesojn de aliaj firmaoj, serĉi partnerojn ktp. Por informoj: Centro "Esperanto", 254200 KIEV-200, P.O. Kesto 539/1, Ukrainio, tel. (7 044) 4328777.

La kultur-komerca centro "Esperanto" kaj la Esperanto-klubo KARE aranĝas internacian renkontiĝon INTER-AMIK'—1, kiu okazos inter la 22a kaj la 28a de aŭgusto 1992. Oni atendas 200-250 partoprenantojn. La renkontiĝo okazos en ripozejo 30 km for de Kiev en pina arbaro libera de radimalpurajoj. Apudas lago, estas naĝbaseno. Por aliĝilo kaj informoj: Esperanto-klubo KARE, 254025 KIEV-25, P.K. 200, Ukrainio, tel. (7 044) 4328777, (7 044) 2236966.

Ĉu vi jam serĉas murkalendarojn por 1993? Librejo en Ĉinio jam akceptas mendojn por du Esperantlingvaj. Ambaŭ estas 75 cm. x 51 cm. kun 12 paĝoj. La temoj estas "Belecoj" (ĉinaj fraŭlinoj) kaj "Ĉinaj Pejzaĝoj". La kosto estas po \$12.00, kiu enkludas la sendokoston. Adreso: Zhang Gui Fang, Dongsi Xidajie 79, CN-100010 BEIJING, Ĉinio.

Niĝeria instruisto, nova studanto de Esperanto, bezonas librojn en la lingvo. Por tiuj kiuj volas sendi, lia adreso estas: George ONUH, Ukwonjo Wesley School, UTONKON, Benue State, Niĝerio.

Winifred Sackville Stoner Jr., talent(eg)a knabino kaj preleganto en Esperanto, loĝis en Evansville, Indiana, inter 1903 kaj 1910. Dum tiu periodo ŝi

verkis *Patrino Anserino* en Esperanto. Tiun, sian duan libron, ŝi sesjaraĝa verkis en 1908. Ŝi kun sia patrino travojaĝis la mondon por disvastigi Esperanton. Ĉu vi havas informojn pri ilia sorto? Se jes, bonvolu skribi al: Maria Nix, 7849 Brookridge Ct., Evansville IN 47715.

*El Ruslando kun amo* aperas nova dumonata 32-paĝa informaj kaj literatura revuo *La Ondo de Esperanto*. Ĝi enhavas tradukaĵojn kaj originalaĵojn, recenzojn, informojn pri agado en Rusio, ktp. Jarabono kostas \$12. Por abono, sendu ĉekon al la usona peranto: Donald J. Harlow, P.O. Box 551, Pinole CA 94564.

Ĵus aperis la 3a kaj 4a numeroj de la revuo *Vjetnamio* por 1992. Vjetnamio estas bela kolorbilda revuo en Esperanto kun sama formato kiel alilingvaj eldonoj; ĝi aperas kvar fojojn en la jaro. Abono kostas \$14.00 por 1992 ĉe: Eldonejo Bero, P.O. Box 13492, Berkeley CA 94701-3492.

La Verda (ekologia, medioprotekta) movado nun komencas utiligi nian lingvon per nova revuo *VERDire—ekologiisma gazeto en Esperanto*. La revuo jam atingis kvin numerojn en marto. Ĝi estas 16-paĝa, presita sur reuzata papero. La enhavo estas interesa kaj grava. Venontaj numeroj traktos: UNCED, kaj ekologiismaj asocioj; Transporto; Someraj raportoj, kaj Agrokulturo; kaj Ekologiismo en la Eŭropa Komunumo. Oni povas aboni la revuon kontraŭ 15 nederlandaj guldenoj (proks. \$9) por kvar numeroj, pageblaj al konto vrdr-d ĉe UEA, kun informo pri la pago al: VERDire, Postboks 2280, N-9002 Tromsø, Norvegio. Provnombro haveblas ĉe: Jean-Claude Thumerelle, Rue Pierre de Sempel 10, B-7784 WARNETON, Belgio.

Longtempan esperantiston serĉas ties pranevo, kiu supozas, ke tiu nun loĝas en Usono. La serĉato estas Oton PANCER, Profesoro de Agrikulturo, el Zagreb, Kroatio; la serĉanto, kiun oni bonvole kontaktu se havas informojn, estas 14-jara knabo Ivo SPIRA, Hellav. 8, N-3140 BORGHEIM, Norvegio.

**Kelkaj anoncetoj jam malaktualaj restas en la rubriko pro diversaj malfrucoj. Ni lasis ilin por montri, kio okazas en la Esperanto-mondo. Bonvolu atenti la datojn!**

## VLADIVOSTOKA SIMPOZIO SIGNALIS NOVAN FAZON DE ESPERANTO-MOVADO EN AZIA-PACIFIKA REGIONO

de *UMEDA Yoshimi*

[S-ano *UMEDA Yoshimi*, longtempa ano de *ELNA*, estas Direktoro de la *Internacia Kultura Laborejo en Tokio*.]

En la urbo Vladivostoko, situanta en malproksim-orienta parto de Rusio, kunvenis 80 esperantistoj el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Rusio por sukcesigi la Internacian Simpozion laŭ la temo "Pacifiko: Lingvo, Kulturo, Kooperado" dum 5 tagoj de la 24a ĝis la 28a de majo, 1992. Tiu ĉi Simpozio estas kunvokita de Esperanto-Klubo 'Pacifiko' en Vladivostoko kaj Internacia Kultura Laborejo en Tokio por honori la 100-jaran funkciadon post 1891 de la unua Esperantista organizaĵo fondita en Azio en la rusa ĉemara urbo kaj por levi la kurtenon de la Esperanto-movado sur la nova scenejo prezentata post drasta ŝanĝiĝo de la monda situacio.

Jus semajnon antaŭe la urbo Vladivostoko altiris la atenton de la mondo pro akcidenta eksplodado de municiaj tenejoj de rusa mararmeo, pri kio la amaskomunikiloj informis vaste tra la mondo kiel katastrofo kaŭzanta eĉ la evakuon de la loĝantaro kaj malpermeson de vizitantoj. Tio ĉi aliflanke ŝinigis la eksterlandajn partoprenantojn ekvojaĝi tien. Malgraŭ tio la Simpozio povis sekure okazi, dank' al la klopodo de la lokaj organizintoj sub la aŭspicioj de oficialaj instancoj de la urbo kaj regiono.

13 simpozianoj el Japanio kaj Koreio kolektiĝis en la urbo Niigata ĉe la Japana Maro la 22an de majo kaj karavane ekflugis al la rusa urbo Ĥabarovsko, kie atendis la reprezentantoj de Ĉina Esperanto-Ligo fluginte de Harbino. Post unu-taga ekskurso tie, la ekster-rusiaj partoprenantoj trajne alvenis en la simpozia urbo, en kies ĉefstacidomo atendis dekoj da rusaj esperantistoj kaj la reprezentantoj de Pac-Komitato de Primorje-Regiono, kiuj varme akceptis la alvenintojn per tradicia rusa bonveniga ceremonio.

Kiel simpoziejon la urba instanco proponis tre dignan Domon de Intertraktado, uzatan kutime por diversaj oficialaj kunsidoj. Aldone en la malferma soleno de la simpozio salutis la reprezentantoj de la regiona parlamento kaj urba filio de Rusia UNESKO-komisiono, kiuj komune montris kaj

substrekis sian fortan subtenon al la simpozio.

Rilate la priatenton al la simpozio flanke de la amaskomunikiloj, jam la antaŭan tagon, la 23an de majo, du regionaj ĵurnaloj aperigis tre favorajn artikolojn pri la simpozio, anoncante pri la Esperanto-lingva prezentado de la municipa pup-teatro kiel unu el la kulturaj prezentaĵoj dum la simpozio.

Krome, la raportistino de 'TASS', la rusa plej granda novaĵagentejo, ĉeestis la sesiojn de la simpozio, intervjuis la simpozianojn kaj sendis la raportojn enlanden kaj eksterlanden. Ne mankis ankaŭ la filmistoj kaj raportistoj de la regiona televida stacio, kiu dissendis en la novaĵhoroj la raporton pri la simpozio. Radiostacioj ankaŭ dissendis kelkfoje pri la internacia simpozio de esperantistoj okazanta en la urbo.

La urbo Vladivostoko disvolviĝis kiel malproksim-orienta ĉemara haveno enira kaj elira de Rusio por internaciaj kontaktoj, sed dum la lastaj jardekoj de la Sovetunia tempo la urbo estis fermita kiel grava mararmea bazo kaj la vivanta informo pri la urbo absolute mankis al la ekstera mondo kiel izolita loko eĉ por sovetianoj, kies vizito estis severe kontrolita. Nur en januaro, 1992, la urbo estis malfermita kaj la urbanejoj nun povas libere kontakti la eksteran mondon. En tiaj cirkonstancoj okazis la simpozio kun subteno de oficialaj instancoj, kio altiris la atenton de multaj homoj pri Esperanto kaj vekis ankaŭ la dormantajn esperantistojn en tiu ĉi regiono, kiuj sin anoncis en la simpozio.

La simpozio konsistis el partoj sesia, kultura kaj interamika. En tri sesioj dekelkaj reprezentantoj el Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Rusio (el ok regionoj kaj urboj) prezentis siajn referaĵojn laŭ la simpozia temo po 15 minutoj kaj preskaŭ ĉiuj partoprenantoj elpaŝis per siaj komentoj, proponoj kaj opinioj, tiel ke la simpoziejon ĉiam plenigis tre arda etoso de kunlaboremo. Kultura parto abundis: tri koncertoj de profesinivelaj gekantistoj impresis la partoprenantojn; japana folkloro dancado, ĉinaj kaj koreaj kantoj kaj surpriza magia spektaklo fare de la simpozianoj; ĉarmaj prezentaĵoj ĉe la Infana kaj Junulara Centro; aparte menciindas la unu-hora Esperanto-lingva

prezentado de municipa pupteatra trupo, pri kies debuta plenumo jam la ĵurnaloj avertis la urbanejojn, invitante spekti.

La simpozianoj aparte vizitis muzeojn kaj geografian instituton, en kiuj troviĝas ne nur lokaj raraĵoj sed ankaŭ historiaj dokumentoj prilumantaj la rilaton inter Esperanto kaj la urbo Vladivostoko.

Interamikiĝo okazis vigle kaj entuziasme inter rusaj kaj eksterlandaj partoprenantoj kaj en la simpoziejo kaj en la hotelo kaj dum la ekskursoj.

En la lasta sesio la simpozianoj subskribis la jenan rezolucion, kiu ja markis la novan fazon de la Esperantomovado en Azia-Pacifika Regiono.

### REZOLUCIO DE LA SIMPOZIO

laŭ la temo "Pacifiko: Lingvo, Kulturo, Kooperado"

okazinta 24-28 majo, 1992, en Vladivostoko, Rusio

Honore al la 100-jara funkciado de Vladivostoka Esperanto-Klubo 'Pacifiko' kiel la unua Esperanto-Asocio en Azio post 1891, kunvenis en la urbo Vladivostoko 80 (okdek) esperantistoj reprezentantaj la jenajn landojn, regionojn kaj urbojn: Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Rusio (el Aldano, Arĉomo, Ĥabarovsko, Kamĉatko, Komsomolsk-sur-Amuro, Magadano, Moskvo kaj Vladivostoko), diskutis pri la supre menciita temo, kaj konfirmis pri la sekvantaj punktoj kiel aferoj komunaj al ĉiuj partoprenantoj.

1) Pri la necesaj paŝoj praktikaj por antaŭenigi disvastigon de Esperanto en Azia-Pacifika Regiono;

2) Pri regula okazigo de similaj aranĝoj kiel la nuna Simpozio en la urbo Vladivostoko, ĉar ni konstatas, ke tiu ĉi urbo prezentas per geografia situo tre konvenan lokon por ligi esperantistojn de Azia-Pacifika Regiono kun tiuj de okcidentaj kaj aliaj partoj de la mondo;

3) Pri konkretigo de komuna kunlaborado inter esperantistaj grupoj de Azia-Pacifika Regiono surbaze de la informada kaj turisma interŝanĝado, utiligante la eblecojn kaj potencialojn de Esperanto; kaj

4) Pri plioftigo de inter-esperantista vizitado trans diversaj landolimoj en la mondo per reciproka helpado materia kaj morala.

Por realigi la supre menciitajn punktojn ni proponas eldonon de komuna informilo por esperantistoj en Azia-Pacifika Regiono, kaj ni komisiis al la organizantoj de la nuna Simpozio, nome Esperanto-Klubo Pacifiko en Vladivostoko kaj Internacia Kultura Laborejo en Tokio, interkonsiliĝi kaj konkretigi la suprajn punktojn komunikante kun esperantistaj grupoj reprezentataj en la nuna Simpozio. Tiurilate ĉiuj partoprenantoj jam esprimas sian plenan subtenon al la nomitaj komisiitoj pri la iniciatoj.

Ĉiuj partoprenantoj aparte esprimas

sian grandan dankon al Pac-Komitato de Primorje-Regiono pro la malavara aŭspiciado realigi la nunan Simpozion.

Ni ankaŭ notas kaj gratulas al la movado Oomoto en Japanio pri la 100-jariĝo de ĝia fondiĝo, kiu koincidas kun la 100-jara funkciado de la unua Esperanto-Asocio en Azio.

Ni sendas pere de la ĉina delegacio niajn korajn bondezirojn al la 5a Pacifika Kongreso de Esperanto okazonta ĉi-aŭguste en la ĉina urbo Qingdao por ĝia granda sukceso.

Ni, simpozianoj, samtempe esprimas

nian moralan subtenon por la sukcesa okazigo de la 79-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, Koreio, en 1994.

Profitante la nunan okazon ni montras nian profundan simpatian al la civitanaro de Vladivostoko pri la neatendita akcidenta eksplodo de municioj kaj deziras al ili rapidan regajnon de bona humoro kaj pli prosperan vivadon.

Subskribis la 28an de majo, 1992, Aleksandro TITAJEV, Yoshimi UMEDA, kaj reprezentantoj de la landoj, regionoj kaj urboj supre menciitaj.

## TESTIMONIALS TO ESPERANTO

*compiled by Catherine Schulze*

For a long time I have thought of putting something together for *Esperanto U.S.A.* about the statements made by postal students on the Evaluation sheets in answer to the question:

*What do you feel about Esperanto in general? Should it be taught in our schools?*

So far, 567 postal students have received their Certificates of Completion. Almost without exception they advocate including Esperanto in the school curriculum. Most recently, the statement by Dale Carter of Orem, Utah, prompted me to do a random search through the evaluations. The observations of these newcomers to Esperanto seem worth sharing:

"Esperanto is an amazing language and has great potential for allowing people to communicate easier and more widely in the world than would happen with natural languages. It would be good to offer it as a language choice in the schools..."

"I lived in Bolivia for two years during which time I learned to communicate in Spanish and Aymará (spoken by Bolivian and Peruvian natives near Lake Titicaca). I have also had minimal instruction in Russian and Mandarin. Since native languages are difficult to learn well, I feel I can learn more about more cultures and people by learning Esperanto. I also intend to encourage others to

learn it.

"Thank you very much for offering the 10-lesson postal course. The lessons are clearly presented and build confidence. My family doesn't have the experience of prior language study, but they are learning quickly and sometimes remembering more than I do."

—Dale Carter, Orem, Utah

Following are some observations by students, taken at random:

"Esperanto should be taught in schools. More people should be made aware of it."

—Thomas Kelley, computer analyst  
"Should be promoted in schools as a second language to reduce insular attitudes and provide an easy, success-loaded experience in foreign language learning."

—David Cowell, printer

"It should be taught as a second language beginning in elementary school."

—John Champlin, M.D.

"Excellent language for elementary schools because of: a) a concept of a foreign language; b) worldwide penpals; c) better grammatical understanding; d) aids learning another foreign language."

—Jim Droege, U.S. Army officer,  
Army Language School

"Yes, in public schools beginning at elementary level."

—Vicki Dickinson, bank employee  
"Esperanto is a necessary first step toward world welfare. It should be taught in

schools."

—Raymond de Lozier, engineer  
"Teaching Esperanto in schools would go a long way toward its general acceptance in our country."

—Karen Roches, bio-engineer  
"It would be very desirable to have it as an elective in our high schools and colleges."

—Douglas Voegeli, bio-engineer  
"Exciting and intriguing language. Schools are not successful in teaching foreign languages but introducing Esperanto would at least inform it exists. For motivation, show its usefulness in telecommunications, international conferences, etc."

—Glenn Williams, computer consultant  
"It should be a required course in our schools!"

—Douglas Hayes, fireman  
"Esperanto is very easy and important for travel and doing business in other countries."

—Dan Quoc Huynh  
"It should at least be an elective but it will be a long fight to get it into the curriculum."

—Mrs. C. J. Storie, dept. store buyer  
"It is a beautiful and expressive language ... I wish more people in the U.S. were interested in it. I think it would be an ideal *lingua franca* for commerce, science, et al."

—Mr. Kennon A. Smith, electrical engineering  
"It should be taught in all schools—man-



datory in college.”

—Thom Illingworth, technical engineer  
“Esperanto should be taught in schools if for no other reason than that it is a good introduction to language learning.”

—Paul Hanks, manager, Waldenbooks  
“It should be taught in schools worldwide. The ‘shrinking world’ makes this imperative!”

—Farrell Eagle, teacher  
“Definitely taught! At elementary school not one person knew what I was talking about. Parents were thrilled about my teaching it.”

—Phyllis Orth, teacher  
“Should be taught in schools. Students would find it more enjoyable than difficult languages such as French and German. It should be promoted in schools through teachers, posters, etc.”

—Ronald Ortmeier, airline employee  
“It should definitely be taught in our schools. College radio can advertise it. You can’t think short-term thought—it would be a great service to humanity if Esperanto were declared by spacefaring nations to be the official language of space.”

—Alan Hensel, student  
“Many people still know nothing about it but friends have used it in China, Russia and other countries very successfully.”

—Mrs. James Fishbaugh, teacher  
“It should be promoted by more visible materials in libraries. I found Esperanto by accident in a library book.”

—David T. Blackburn, software engineer  
“If taught in schools, it should be taught in ours!”

—Margaret Blomquist, scientific editor  
“If not taught in schools, at least it should be publicized to students.”

—Kevin Mead, auditor  
“Jes, teach it; give language credits.”

—Jorj Strumolo, writer & painter  
“It should be taught in our schools. Esperanto could be a great help in easing international tension...”

—Michael Fleck, optician  
“I have become enthusiastic and will do whatever I can to foster its use. There are two points I can make about Esperanto: a) it promotes internationalism; b) it’s a language that impresses the learner with its fast results.”

—Ralph Joly, Ph.D.  
“It does work. I could understand Swiss Radio broadcasts in Esperanto without much difficulty. I think it would help especially in technical fields. It is harder

than I thought because it is a real language—not a jargon...”

—Steve Gustafson, attorney  
“I would love to see it in preschools and elementary schools as an introduction to language study. Unfortunately, I have worked with school systems and know how hard it is to sell something this novel and unfamiliar to parents.”

—Roger Blais, Vice Provost, University of Tulsa  
“I have more respect for Esperanto than when I started. I now understand that it is a living language in its own right.”

—Johnny Walker, computer assistant

## DECIDOJ DE LA ESTRARO DE ELNA

En la unua parto de 1992, kaj ĉe la ELNA-Kongreso, la Estraro decidis pri la jenaj aferoj:

La Estraro aprobis daŭrigon de la 800-numero en la Centra Oficejo de ELNA, ankoraŭ eksperimente, dum ankoraŭ ses monatoj, ĝis la 20a de septembro 1992.

La Estraro aprobis, ke jam pagita kotizo por ELNA-Kongreso estu redonita al la paginto, minus \$10 por administraj kostoj, se la Centra Oficejo ricevos skribitan peton por repago antaŭ dato, kiun fiksos la Loka Kongresa Komitato, sub la kondiĉo, ke tiu dato neniam estu malpli ol tri semajnoj (21 tagoj) antaŭ la komenco de la koncerna Kongreso. Tiu limdato devas esti klare indikita sur la aliĝilo.

La Estraro aprobis, ke el la profitoj pro vendado de la propraj eldonaĵoj de ELNA, 50% iru en la Ĝeneralan Kason kaj 50% iru en la Eldonan Fonduson.

La Estraro decidis, ke la Estrara Komunikilo ne estas konfidenca krom eroj pri stabaj salajroj, dungoj aŭ maldungoj, eroj pri akuzoj aŭ eksigoj de membroj, kaj eroj pri juraj procesoj. Ĉiujn tiajn erojn la Prezidanto indiku kiel konfidencajn.

La Estraro decidis nomi komitaton kiu rekomendu ĉu la estonta investa politiko de ELNA permesu ankaŭ akcian investadon kaj, se jes, laŭ kiaj kondiĉoj.

## NEKROLOGOJ

† FISHER †

Conrad Fisher, Ĝenerale Sekretario de la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo (ISAB), mortis iom antaŭ la tagmezo de mardo 23a de junio, pro subita korhalto, ĉe sia hejmo en Meadville, Pennsylvania.

Nelonge post la fondiĝo de ISAB je la 8a de marto 1978, d-ro John L. Lewine, ties unua Prezidanto, kaj d-ro Stanley J. Drake, la Ĝenerala Sekretario, petis al Conrad Fisher servi kiel Sekretario. Kiam d-ro Lewine mortis en 1982, d-ro Drake sekvis Lewine kiel Prezidanto kaj s-ro Fisher estiĝis Ĝenerala Sekretario. Preter tiu posteno, Conrad Fisher servis kiel Redaktoro de la Esperantlingva *Bulteno* de la Societo kaj gvidis la korespondajn kursojn en Esperanto.

ISAB-Prezidanto Stanley Drake, kiu konis Conrad dum dudek jaroj, diris, ke la morto de Conrad estis perdo de bonega amiko kaj kolego, kaj ke tiu morto estas granda perdo al la societo kiun Conrad servis tiel longe kaj diligente.

Conrad ekstudis Esperanton en 1925 je la aĝo de 13 jaroj, renkontinte la lingvon tute hazarde kiam li balais najbaran kelon, trovis ĉifonitan kopion de la gazeto *Radio News* (nun *Popular Electronics*) kaj en ĝi vidis artikolon pri Esperanto verkitan de James Sayers.


En 1933 li estiĝis delegito de UEA, kaj en 1936 li partoprenis la EANA-kongreson en Detroit. (EANA estis la antaŭulo de ELNA.) Li servis kiel Sekretario de ELNA ĝis julio 1971. La Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA) honorigis lin en 1986 per elekto al Honora Membreco pro elstara kontribuado al Esperanto kaj la Ligo.

Mi renkontis Connie (kiel nomis lin liaj amikoj) unue nur perkoresponde, dum la fruaj jaroj de la ekzisto de ELNA, probable en 1953 aŭ 1954. Komenciĝis vigla korespondado. Li foje ŝprucis ideojn kiel fajreroj, kaj ĉiam serĉis praktikan agadon por Esperanto. Kiel ekzemplo, la ELNA-insigno videbla sur la kovrilo de la ELNA Listo de Membroj estis desegnita de li antaŭ multaj jaroj kaj ankoraŭ uzata.

Conrad havis multajn esperantistajn amikojn en multaj mondpartoj. Kiam li akompanis d-ron Drake al la Jarcenta Festo de Esperanto ĉe la Universala Kongreso en Varsovio en 1987, Drake miris je kiom da personoj renkontitaj konis Conrad Fisher kaj estis feliĉaj renkonti lin persone.

Postvivas s-ron Fisher la edzino Irene, filinoj Marcela, Rose, kaj Margaret J. Childs kaj aliaj familianoj.

William R. Harmon



## LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc. Comments for publication may be sent either to the address of ELNA or to Don Harlow (EUSA), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, 72627.2647@compuserve.com.]

In Esperanto U.S.A. 1992(2), Derek Roff says that "... we see that the important issue is not a change in the language so much as a change in the way its speakers choose to think about the world."

I couldn't agree more. No amount of tinkering with any language will address the bias, intolerance, or ignorance of its speakers. The question we should ask is whether Esperantists are forward-thinking, progressive, tolerant and compassionate. I have found from my own experience that, by and large, they are. It also seems to me that if they were not, they wouldn't bother themselves with learning the language in the first place.

A good carpenter doesn't blame his tools. I use Esperanto, with all its real or imagined flaws, in the conviction that it is the best tool available to do the job it was intended to do: communicate across language barriers. While using it I can express my kindness—or unkindness—in ways only limited by my intentions and my imagination. Esperanto, like any other language, has the resources to say whatever I choose to express about the way I look at the world.

Reg Reid

Antaŭnelonge mi aŭskultis programon de la BBC (pere de Nacia Publika Radio). La programo estis pri la malbonaj monaj kondiĉoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Laŭ la programo, la Unuiĝintaj Nacioj havas fiskan krizon. Ekzistas multaj nacioj (Usono antaŭiĝas) kiuj ŝuldas monojn al la UN sed ankoraŭ ne pagis. La Ĝenerala Sekretario serĉas monrimedojn kaj ankaŭ deziras forigi multkostajn kaj malŝparajn programojn. Li jam forĵetis superflujajn projektojn kaj maldungis kelkajn malnecesajn dungitojn.

Ŝajnas al mi, ke nune estas la favorega okazo por UEA konvinki ĉi tiun

inteligentan burokraton ke la lingvo Esperanto povus ŝpari grandajn sumojn da mono. La Unuiĝintaj Nacioj havas grandegan stabon. La plimulto de la oficistaro estas oficistoj, tradukistoj kaj interpretistoj. Mi ne devas klarigi al vi la signifecon de tio, ke se la UN uzus ekskluzive unu lingvon—Esperanton—tiam la UN kaj Esperanto ambaŭ profitus grandege. La Unuiĝintaj Nacioj povus funkcii pli efike kun frakcio de ĝia kuranta oficistaro, kaj estus grandaj ŝparaĵoj. Ankaŭ Esperanto efektivigus tre gravan venkon.

Esperable Esperantujo ne perdos ĉi tiun ŝancon.

Walter W. Cardwell

[Mi ne hezitas rekomendi al ĉiuj interesitoj, ke ili skribu leterojn (kompreneble, dignajn kaj logikajn, ne emociajn kaj fervorajn) al s-ro Butros-Ghali, la aktuala Ĝenerala Sekretario de UNO. Sed mi proponas, ke oni ne atendu entuziasman respondon. La historio de Esperanto ĉe UNO ne estas tre esperiga kiam temas pri la atento de tiu organizo.]

[Chris Nelson estas la redaktoro de la bulteno *Bananoj en la Dezerto*, la organo de la Nevada Inform-Centro Esperantista en Reno, NV. La jena letero unue aperis en tiu revuo; Chris proponis, ke ni reapertigu ĝin.]

Je la komenco de ĉi-tiu jaro la Nevada Inform-Centro Esperantista ricevis propagandajn el politika partio nomata "Radikala Partio", partio kiu, interalie, luktas "neperforte" por esperantigi Eŭropon "TUJ" "Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo". Krom ke la partio havas, laŭ mi, multe da bonaj ideoj, mi timas pri la partia miskomprenig-ebleco al la neesperantista mondo pri Esperantujo.

La partia simbolo estas Gandhi, kies portreto formiĝas per la multfoja skribo de la partia nomo en pluraj lingvoj. Mi rimarkis, ke la nomo ne troviĝas en iu ajn lingvo el Hindujo (Bharato), sed jes en la araba kaj la ĉina ktp. La nacian lingvon de Bharato, la hindustanan parolas 465 milionoj da homoj laŭ la lasta numero de la Almanako—jam pli ol la 432 milionoj da anglalingvanoj en la mondo!! Tiu-ĉi fakto meritas konsideron de la partio...

La partia ĉefa etiko estas la

"neperforto", kaj la partio volas sekvi la modelon de Mahatma Gandhi. Gandhi neperforte kontraŭstaris sian tiaman registaron—tiam dependan je Britujo. Ankaŭ li rimarkis la militadon interreligian en sia lando. Do, li, kiel jam amata lidero, decidis fasti ĝis la haltiĝo de la bataloj. Li kunigis sian diverslingvan kaj diverskulturan landon kaj malkoloniigis ĝin mirinde ne per la uzo de forto (do, la "neperforto"). Nenies sango verŝiĝis pro liaj ordonoj. Jen bona modelo por politika partio.

Mahatma Gandhi konatiĝis, almenaŭ inter la britaj koloniistoj, kiel "radikalulo". Krom ke s-ro Gandhi amadis pacon kaj voladis tion plej bonan por sia lando, lia nesubmetiĝo al lia brite dependa hinda registaro igis, ke li estu nomata "radikalulo". Tiu vorto tamen pensigas al multe da personoj pri "sensenca persono". Oni scias nun, ke Mahatma Gandhi tute ne estis senseca, sed la tiama registaro, kiel multe da aliaj, tial nomis lin pro lia nesubmetiĝo. Laŭ la britaj koloniistoj, Gandhi estis ja senseca persono.

La partio, inter aliaj el siaj platformeroj, volas uzi Esperanton kiel ĉefan perilon por la lingva justeco kaj egaleco en la Eŭropa Komunumo kaj plu en la mondo. Bona ideo. Ĝi tutkore invitas al la tuta esperantistaro enpolitikiĝi almenaŭ por tiu lingva celo je la "neperfortismo".

Jen la problemo. Ĉar Mahatma Gandhi konatiĝis kiel "radikalulo" inter la tiama koloniistaro, la partio do uzas la vorton "radikala" en sia nomo. Ankoraŭ tre multe da personoj eĉ en Eŭropo neniam aŭdis pri Esperanto. Se la "Radikala Partio" estos ilia unua priaŭdilo por Esperanto, verŝajne ili ekpensos, ke esperantistoj nur estas radikaluloj, kaj do sensenculoj, kaj tial eble perfortaj, kiel iuj sinnomantaj radikaluloj. Tial multe da tiuj priaŭdintoj antaŭvideble malamikiĝos je Esperantujo, malinteresiĝante pri la partiaj ideoj kaj proponoj veraj.

Esperantujo estas liber-kultura, liberforma, kaj liberevolua. Ĉiu esperantisto estas kunkreanta vivero de Esperantujo. Ĉiuj alportas siajn proprajn personecojn, ideojn, kaj kreivaĵojn kaj interdonas ilin kun aliaj esperantistoj kaj jen Esperanto-kulturo. Eble aliaj esperantistoj havas malsamajn ideojn pri Esperant-ujo ol la jenan. Ili ankaŭ bonvenas en nian "ujon". Mi volegas, ke Esperantujo restu ĉi-tiel. Politikaj nomoj, kiel "radikala", ktp., nin metas en tro

malgrandan ujon kiu nebone reprezentas ĉiujn esperantistojn. Nia "ujo" ne havas limojn. Reale ĝi estas "malujo"...

Artikolo en la revuo Esperanto estas titolita "Esperanto en la Politikon!" Mi diras "Esperanto ĉien!"

Chris Nelson

[*Estus interese diskuti sur ĉi tiuj paĝoj la eventualajn estontajn rilatojn inter Esperanto kaj politiko, en Eŭropo kaj ankaŭ aliloke.*]

[**Adolf Burkhardt estas administranto de la Biblioteko de Germana Esperanto-Instituto.**]

En n-ro 1991(7) vi skribas pri *modstand, fernsprechen, flano*—tre interesa temo. Sed rilate al la germanaj ekzemploj, la vero estas pli komplika ol viaj informantoj kredigis al vi. [Aŭ eble la redaktoro simple misaŭdis.—DH]

La premo de la angla lingvo ja estas evidenta, sed ĝi estas absolute egala en la tuta lando, do la regiono ĉirkaŭ Frankfurt ne prezentas escepton. Ĉefe kulpas televido kaj la populara muzika kulturo, kiuj pleje helpas inundi nian lingvon per anglismoj. Kaj ĝuste la vorto "televido" estus bela ekzemplo por ilustri vian argumenton—kaj "telefono"—ne!

Ĉiu diras "fernsehen" = televidi, "das Fernsehen" = televido, "der Fernseher" = televidilo. Tiuj vortoj estas absolute normalaj en ĉies buŝo. Pasive ĉiu komprenas ankaŭ Television, Eurovision, sed neniu aktive uzus ĝin, kaj neniam venis la ideo krei verbon "televidieren".

Tute malsama estas la situacio rilate al "telefoni". La analogo serio ja ekzistas—"fernsprechen" (telefoni), "Fernsprecher" (telefono), tamen "fern-mündlich" (telefona, telefona) kaj ne la atendebla "fernsprechlich" aŭ "fern-sprechig". Sed neniu iam aktive uzis ilin, krom en oficialaj dokumentoj—do la venko de "telefonieren" ne estas lastatempa fenomeno. Male, sendistinge de la eduka nivelo, por ni la germanaj vortoj ne perdis sian artefaritecon, kvankam ni regule ricevas la fakturon "Fernspechgebühren", telefona budo estas "Fernsprechzelle" ktp, sed nur en la skriba lingvo de la burokratoj. (Cetere, "Fernschreiben" estas normale uzata; neniam proponiĝis io simila al teletypieren—sed lastatempe venkas "faxen" kiel en Esperanto "faksi"—sen "tele").

Mi havas du klarigojn, kial tiel malsame reagas la popolo al esence

samtipa afero.

Unue, la telefono enkondukiĝis sisteme kun la vorto Telephon, telephonieren. Poste oni adaptis nur la ortografion—"telefonieren, telefonisch, Telefon". La provo uzi germanajn vortojn sekvis poste, kun la rezulto, kiun mi skizis. Due, la radiko "telefon" montriĝis pli oportuna. Oni povas senprobleme paroli pri *das Telefon, das Telefonieren, telefonieren, telefonisch*, kaj formi ĉiujn kombinojn—*Telefonverzeichnis*, dum por la germanaj vortoj necesas pluraj radikoj, por ne menci la konjugacion kun la dispartigita "ich sprache fern", "sprechen Sie fern?".

Kial la procedo sukcesis rilate al "Fernsehen"? De la komenco oni uzis la terminon—tio verŝajne estas la plej grava kialo. Krome la vorto sufiĉis—la adjektivon kaj adverbon oni ne bezonas, do ne aperas la embaraso kiel ĉe "telefona", kiam necesis nove trovi vorton, kaj en kombinoj ja la radiko perfekte taŭgas por ĉiaspecaj kunmetoj: *Fernseh-sender; -übertragung, -moderator, -rechte, -bilder* ktp (same kiel *Fernsprech-* por kombinoj tute taŭgas).

Via argumento tamen restas pripensinda, kvankam ofte la popolo decidas alie ol la rezonanto. Piron sendube troigas kiam li prezentas sian teorion—dum li mem en la praktiko ankaŭ sekvas tre ofte simple la oportunon—kaj tion oni ne povas principe solvi, ĉu la indiĝena vorto estas pli oportuna aŭ la importita—la vivo decidas de kazo al kazo.

Adolf Burkhardt

Multan dankon por la "Guest Editorials" en EUSA 1992(2). Mi volas aldoni unu komenton (kiun mi unue aŭdis pri Mensa, sed ĝi ankaŭ taŭgas pri la movado).

Esperanto ne estas ŝipo, kiun ni provas gvidi tie aŭ alie. Konsideru ĝin anstataŭe kiel la okeano, per kiu ni ĉiuj rajtas gvidi niajn proprajn ŝipojn.

(Se vi uzos ĉi tiun kiel letero, bv. menci, ke mi ne inventis la dirajon. Dankon!)

David Wolff

Don, mi kredas ke *EsperantoUSA* subtaksis la nombron de konektitaj Esperantistoj refoje. Mi povas ricevi E-poŝton ĉe du adresoj. Vi povas sendi E-poŝton al mi tra GENIE kiel "F.MEYER6". Vi ankaŭ povas sendi E-poŝton al mi tra INTERNET kiel

"fmeyer@lobby.ti.com". Bonvolu aldoni mian nomon kun tiuj ĉi adresoj al la ELNA listo.

Mi opinias ke ni bezonas pli da informo pri la uzo de Esperanto kaj en internaciaj elektronikaj afiŝaroj (Internet, CompuServe, Genie, kaj ...) kaj en elektronika poŝto en Esperantaj periodaĵoj.

Ekzemplo de tiu bezono estas mia sperto kun Genie. Kiel nova uzanto de Genie mi ne povis trovi Esperantan afiŝaron. Poste mi eksciis ke estas du afiŝaroj en GENIE pri Esperanto. Dave Gaines komencigis la unuan. Mi, pro tio ke mi ne trovis la unuan, ekis duan afiŝaron tie. La unua afiŝaro plejparte uzas la Anglan. La dua uzas kaj la Anglan kaj la Esperantan. Ĉu oni trovas multon de Esperantaĵoj en CompuServe?

La situacio de elektronikaj afiŝaroj similas al tiu de kurtonda radio sed estas pli kompleksa. Estas centoj, eble miloj, da elektronikaj afiŝaroj pri diversaj temoj. Do simpla indekso de adresoj de Esperantaj afiŝaroj estus tre helpa.

Fred Meyer

[*Pri tia indekso mi forte konsentas; kiu estas preta kompili ĝin? Aktiveco ĉe CompuServe iom stagnas nuntempe, ĉar la CompuServe-anoj eltrovis Internet; sed la Esperanto-biblioteko de CompuServe restas plena de interesoĵoj. Tiuj, kiuj volas aldoni siajn retadresojn al la ELNA-adresaro, devos informi la Centran Oficejon pri tio.*]

Jen estas iom amuza rakonto pri Esperanto el nia aktuala mondo. Eble vi povas uzi ĝin por *Esperanto USA!*

Mia amiko Mikelo ĵus aĉetis novan presilon de la firmao Hewlett-Packard. Ĉi tiu nomiĝas "Color-Jet Printer", kaj reprezentas la plej altan presil-teknologion. Kiam mia amiko instalas ĝin, li provis la funkciadon de la maŝino pere de la ekzemploj kunsenditaj kun la presilo. Por ne ofendi iun ajn, la grafikajoj presigotaj enhavis tekstajn etiketojn sensencajn, kiel "QWERTY", "BOB", ktp. Imagu kiom mia amiko surpriziĝis, kiam sur la lasta ekzemplo aperis la vortoj "MALNOVA SED BELA"! Fakte, mi nun imagas vastan reton de komputilaj "talpoj" por Esperanto...

Glenn Williams

[*Vere la "plej altan presil-teknologion"!!!*]

**Daŭrigota sur paĝo 15**

## LANGUAGE IN THE NEWS

[Not only aircraft crash and burn because of language problems...]

In issue 1991(3) we reported an apparent linguistic blunder in a *Time* magazine interview with French actor Gerard Depardieu. During the interview, Depardieu mentioned that he had, in his teenage years, witnessed a rape; but the translator rendered this passage as "assisted in" rather than "witnessed." Now the *Sunday Times* of London reports that "by general agreement, what lost Depardieu his foreign-actor Oscar last year for *Green Card* was [this interview] ... On such linguistic confusions are Oscars lost; heaven help us when they open the Channel Tunnel."

[From a report in *La Brita Esperantisto*, Jan.-Feb. 1992.]

[You'd think that the USSR would have thought of the problems they were going to cause us before they broke up!]

As the State Department scurries to keep pace with the Soviet Union's division into 15 separate states, U.S. diplomats are finding that it will be a lot tougher to speak the language of diplomacy in such locales as Kirgizstan and Kazakhstan.

"For most of these new states, we have virtually no one who knows the language," said Paul Goble, a former department official who specializes in studying the different Soviet nationalities.

"There aren't that many, but we do have people who speak Armenian, Ukrainian and the Baltic languages," a department official said. "There also are other republics where they speak languages that already are in use by American diplomats. In Moldova, for example, the local languages are Romanian and Russian; Byelorussian, the language of Belarus, is a variant of Russian that can be handled easily by our Russian-speaking officers."

The big problem, the official added, is with Central Asian languages such as Uzbek and Kazakh. "We've identified a very small number of people who, in one way or another, have picked up a smattering of these languages, but their knowledge doesn't go very deep," he said.

[Condensed from an article by John M. Goshko in *The Washington Post*, reprinted in the *Oakland Tribune*, Jan. 19, 1992.]

[Here's a passage from the pages of *The European*, "the first European newspaper," printed completely in English, for English-speakers.]

Spanish lexicographers are fighting back against the bastardization of one of Europe's great languages. The country's purists are launching a full-scale battle against everything from anglicisms like *body* and *panty* to mispronunciations that are plaguing the country.

The world's third most widely used language, Spanish, is spoken by more than 300 million people around the world.

Spain's Royal Academy of Language has decided to use the country's media to weed out foreign influences.

Some examples of different versions of the same word include *carne* instead of *carnet* or *chalé* instead of *chalet*. Differences may seem insignificant to all but the traditionalists like Fernando Lazaro Carreter, new director of the Academy, who finds it appalling that *guisqui* is pronounced in the anglicised manner, as whisky, rather than as it is written in Spanish.

[Condensed from an article in *The European*, Jan. 3-5, 1992; pointed out by Ionel Onet.]

[Intelligence finally shows some intelligence.]

Only about 8 percent of our college students are enrolled in foreign language courses, because most American colleges and universities do not require knowledge of a foreign language in order to graduate. Thus the forthcoming creation of a \$150 million federal trust fund—the brainchild of Sen. David Boren of Oklahoma—to provide more scholarships for college students interested in learning foreign languages is especially welcome. Allocations to create the trust fund will come from the quite ample U.S. intelligence budget.

Boren does not overstate the case when he warns that "our ignorance of world cultures and world languages represents a threat to our ability to remain a world leader." For our basically monolingual society, the new program represents the most prudent, farsighted use of government intelligence funds that we've witnessed in a long time.

[Condensed from an editorial in the *San Mateo, CA, Times*, Jan. 28, 1992; provided by Cathy Schulze.]

[Dutch treat.]

A recent article by David Lawday in *U.S. News & World Report* seems to have been intended as a eulogy for the Dutch language which, Lawday thinks, is about to collapse before the unstoppable onslaught of English. Lawday quotes quite a number of offensive comments about the intrinsic quality of the Dutch language, and offers as proof of governmental surrender to English Education Minister Jo Ritzen's proposal to use English as the working language in Dutch universities—a proposal that was almost immediately junked by the Dutch government when it was made in 1990.

[Very short—no more than it deserves—description of an article by David Lawday in *U.S. News & World Report*, Jan. 27, 1992; sent by John Massey.]

[To be reported in Voĉo de handikapuloj?]

The Department of Transport has explained that applicants wanting driving tests in the Welsh language have been labelled "disabled" because the computer system only has space at present under that heading. In a letter to Gwyneth County Council from its Manchester base, the Department said: "In no way does the Department consider any person whose first language is not English as disabled."

[From *The Observer*, Jan. 19, 1992; reported by Steven Brewer.]

[Anybody for a wet T-shirt contest at next year's ELNA Congress?]

A sign on San Francisco's Telegraph Hill reads: CAUTION PEDESTRIANS SLIPPERY WHEN WET.

[From the *San Francisco Chronicle*, Feb. 17, 1992; provided by Ionel Onet.]

[And they closed down the German course at my daughter's school this year!]

When Eastern Europeans seek to expand their intellectual horizons, they will most likely learn German and read German books, according to language institutes and university enrollment data.

In Czechoslovakia, where schoolchildren last summer chose their own language courses for the first time, half the students picked German. About 30 percent chose English and only 10 percent

# POR LA JUNULOJ...

## JUNULARA PAĜO

Saluton, gejunularo! I'm the new ELNA Commissioner for Youth Affairs and it's a pleasure to introduce myself to you, and to the ELNA membership at large. Allow me to introduce myself: I'm 30, not quite a "youth" anymore, and have been an Esperantist for about 15 years or so. I am a past president of the Esperanto Society of Washington, D.C., and co-coordinated the ELNA Congress there in 1987. I'm currently a UEA delegate and the United States representative for Muzika Esperanto-Ligo, the international "fakgrupo" for musically inclined Esperantists. As someone who is returning to school this fall & is oriented in general towards academic settings, I have a special interest in young people in terms of Esperanto activity. I welcome all of our new Youth Members—those of you 27 and under—and encourage each of you to take an active part in ELNA. The Esperanto youth movement has been historically weak in

this country and we need to begin actively rebuilding it. You can help by contributing your opinions, attending meetings and events, meeting your Esperantist peers—and by using Esperanto regularly. One of my goals is to help our younger members to experience the fun and satisfaction that I had from learning Esperanto as a teenager. Together we can create a more enjoyable and useful environment for you in which to be an Esperantist.

Don Harlow has graciously allotted us a certain amount of space in each issue of *Esperanto U.S.A.* This may increase as time goes by according to the interest generated. This is YOUR space. Please write to me or to Don with your ideas and suggestions, your comments, and your creative efforts ... essays, poetry, song lyrics, random thoughts ... anything that says what you as a young person want to say! This is also the place where I will pass along news of interest to young

American Esperantists, and share messages and thoughts from your peers in other countries. In the future I will be writing in a mix of Esperanto and English, biased towards Esperanto of course, but I will keep important general news items in English so that everyone will understand. Please consider keeping your original contributions in Esperanto, though if you are an absolute beginner don't let this stop you from writing in English ... anything you have to contribute is welcome! Please also be aware that if you have access to a personal computer and a modem, I may be reached on America Online at DGAINES7 and on GENie (GE Mail) at D.GAINES7.

Ĝis la proksima fojo, mi sendas ĉiajn bondezirojn al vi ...

Dave Gaines  
ELNA Commissioner  
Youth Affairs

[You can send submissions directly to the editor at the ELNA Central Office, at his home address (P.O. Box 551, Pinole CA 94530), or through Compuserve (72627,2647) or Internet (72627.2647@compuserve.com).]

## SIMFONIA ĤORO KANTAS ESPERANTE

de Maya Kennedy

Honore al la 75a datreveno de famkonata komponisto Lou Harrison, la Oakland (Kalifornio) Simfonia Ĥoro prezentis koncerton kies kulmino estis lia *KoroSutro* kantata en Esperanto. Glora muziko ravis la aŭskultantaron, inkludante lokajn esperantistojn, kiu plenplenigis la Unuan Presbiterianan Preĝejon.

La temo de la koncerto estis vojaĝo de la koro el kaptiteco al libereco. Kiel korbato, forta perkuta elemento ligis la diversajn verkojn. La programo inkludis muzikon novan kaj antikvan, okcidentan kaj orientan: la unua prezento de *Let My People Go*, de Aaron Blumenfeld; sceno el *Ordo Virtutum*, de la mezepoka abatino Hildegard von Bingen; *Prison Song*, de Hans Werner Henze, bazita sur poemo de Ho Chi Minh; kaj *Y Después*, de William Ludtke, bazita sur poemo de Federico García Lorca, unuafoje prezentita kun ĥoro kaj mansonoriloj.

*Koro Sutro*, komponita por ĥoro kaj amerika gamelano, baziĝas sur esenca teksto de budhismaj sanktaj skriboj. Gamelano estas indonezia aro da agorditaj perkutaj muzikiloj. La "amerikan gamelanon" luditan en *Koro Sutro*, kiu estis inter la unuaj konstruitaj en Usono, faris William Colvig kun Lou Harrison el aluminiuj tuboj kaj platoj, grandaj ladskatoloj, kaj modifitaj oksigenrezervujoj.

*Koro Sutro* komenciĝis per momento da silento. Poste triopo da gemonafioj ĉantis la sutron sanskrite kaj angle en tradicia monotono. Sekvis la ok mallongaj movimentoj de Lou Harrison, esprimivaj kaj riĉaj je buntaj, ekscitaj, nekutimaj harmonioj kaj tekstaraĝoj. La elparolado de la granda ĥoro estis preskaŭ perfekta (kontraste al la programotoj, kiuj entenis plurajn erarojn). Je la fino estis alia momento da silento, tra kiu klare resonis la lastaj vibroj de la gamelano.

Dum intervjuo antaŭ la koncerto, Lou Harrison preparolis la unuan prezenton de *Koro Sutro*, unu el siaj plej gravaj verkoj, antaŭ internacia grupo da esperantistoj en 1972. La kritikistoj ignoris ĝin, sed recenzoj alvenis el la tuta mondo—en Esperanto.

## Daŭrigata de paĝo 4

majo 1992). Esperanto Society of Chicago, P.O. Box 64774, Chicago IL 60664-0774.

## NEW YORK

En aprilo, la Esperanto-Societo de Novjorko gastigis plurajn eksterlandajn gastojn. Kun ges-roj Jim kaj Nancee Medrano loĝis: Allan Morgensen, Vic-Prezidanto de la Esperanto-Klubo en Næstved, Danlando, kaj redaktoro de la kluba novaĵletero; Gilbert kaj Marie-Paul Taddei de Metz, Francio; kaj Jozefo Reinart de Bratislava, Slovakio. La aprilan kunvenon de la Societo partoprenis ne nur s-ano Reinart, sed ankaŭ s-ano Masaŝi Nakamura, kiu vizitis Usonon por partopreni en la geedziĝfesto de amikoj. (raportis *Novjorka Prismo*, majo 1992) Esperanto-Societo de Novjorko, c/o UEA, 777 UN Plaza, New York NY 10017, (212) 687-7041.





# RECENZE

**Rakuša, Rudolf:** *Metodiko de la esperanto-instruado*. Rotterdam: UEA, 1991 (3a eldono). ISBN 92 9017 045X. 189 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo MET 004, Prezo \$11.00 (nemembroj) / \$10.45 (membroj).

Kiel oni instruu Esperanton? Se oni estas profesia edukisto, ĉu oni uzu la samajn rimedojn kiel por aliaj fremdaj lingvoj? Se oni ne estas profesia, kion oni devus scii pri kiel instrui lingvojn?

Jen libro kiu klare kaj detale respondas tiujn demandojn. Kvankam ne nova (la unua eldono aperis en 1957 sub la titolo *Instrumetodo por Esperanto*), *Metodiko de la esperanto-instruado* ankoraŭ valoras, aparte ĉar ĝi estas "tute internacie redaktita". La aŭtoro celas al instruado al infanojn lernejoj; tamen, laenhavo povas helpi al neprofesiaj instruantoj kompreni la "pedagogian lingvon" kaj la principojn de instruado por ĉiaj lernantoj de Esperanto.

La unuaj tri ĉapitroj temas pri la unikeco de la Esperanto-instruado, lernanto, kaj lingvo. Sekvas la dua parto "Ĝenerala Didaktiko", kiu inkluzivas tiajn principojn kiaj la jenaj:

- a) Konkretigu la instruadon!
- b) Aktivigu la lernantojn!
- c) Estu bonhumora!
- d) Ebligu bonan klarigon, sufiĉan ekzercon, kaj oftan uzadon dum ripetado!

En la tria parto ("Speciala didaktiko aŭ metodiko") la aŭtoro skizas la evoluon de la fremdlingva metodiko, de "mil jaroj de nura gramatika metodo" ĝis la "moderna elektanta metodo", de kiu li konsideras la lernolibron *Step by Step* bona ekzemplo. Ankaŭ traktitaj estas lingvaj laboratorioj kaj laŭprogramaj lernolibroj; Esperanto kiel konkordo al aliaj lingvoj; kaj—verŝajne plej grave—principoj de la metodiko de Esperanto-instruado.

En la lasta sekcio de la tria parto troviĝas praktikaj aplikoj; ekzemple, instruplanado (inkluzive provlecionojn por elementa, daŭriga, kaj supera kursoj); instruhelpiloj; pritrakto pri prononco, gramatiko, konversacio, legaĵoj, skribaj laboroj, tradukado, kaj korespondo; kaj liberaj aktivecoj de la infanoj.

Tre utila estas la indekso de propraj nomoj kaj detalaj temoj, kaj la ok provlecionoj; kaj tre agrabla estas la preskaŭa neekzisto de pres-eraroj.

Jen libro, kiun ĉiu serioza instruanto de Esperanto devus ne nur aĉeti sed ankaŭ studi kaj apliki!

**Doroteo Holland-Kaupp**

**Janton, Pierre:** *Esperanto: lingvo—literaturo—movado*. Rotterdam: UEA, 1988. ISBN 92 9017 034 4. 119 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo ESP011, Prezo \$10.00 (nemembroj) / \$9.50 (membroj)

Inter pluraj libroj pri Esperanto aperintaj okaze de la jubilea jaro, tiu de Prof. Janton estas aparte bonvena, kaj trafe komplementas tiun de William Auld, *La fenomeno Esperanto*.

La verko de Auld celas informi laikojn pri Esperanto, kaj do estus pli trafa en traduko. Ĉi tiu verko estas verkita je pli altgrada nivelo. Ĝi enhavas ses ĉapitrojn. "Esperanto kaj la planlingvoj" estas sufiĉe funda studo pri la historio de planlingvoj, kun sufiĉe granda emfazo ankaŭ je la fruaj filozofiaj lingvoj. "Origino de Esperanto" klarigas ne nur la metodojn, sed ankaŭ la pelfortojn malantaŭ Esperanto. En tiu ĉapitro, Janton ne hezitas ankaŭ klarigi la idean kaj idealan fonon de la lingvo; verŝajne li sentas, ke tiuj flankoj de la Esperantomovado ankaŭ efikos al la ekstera mondo, ne nur la sensuka emfazo je Esperanto kiel neŭtrala internacia lingvo. En la tria ĉapitro, "La lingvo", Janton klarigas la strukturon de la lingvo mem, je tre alta nivelo, kun eltrovo de pluraj sintaksaj reguloj, kiujn mi neniam antaŭe vidis surpaperaj. Janton ankaŭ bone klarigas la adverbigajn kaj adjektivigajn alternativojn por la prepoziciaĵoj, kaj, same kiel en artikolo lia en *Acta Interlinguistica*, laŭdas la plurecon de esprimrimedoj en Esperanto kompare kun la etnaj lingvoj. Tiun temon li pluigas en la kvara ĉapitro, "La esprimivo de Esperanto", kiu nature kondukas al la kvina ĉapitro, "La literaturo", en kiu li diskutas la historion de la Esperanta

literaturo en tri fazoj apartigitaj de la du mondmilitoj. Fine, "La esperantista movado" traktas la organizan strukturon kaj la celojn de la movado.

Janton dediĉis multajn jarojn al la pretigo de ĉi tiu libro. La verko aperis unue en franclingva eldono, kiel parto de la kolekto "Que sais-je?", en 1973; poste sekvis eldonoj hispana, germana kaj nederlanda. La nuna Esperantlingva eldono estas aktualigita, laŭ peto de UEA, por la esperantista publiko. Janton mem estas profesoro en la Universitato de Clermont-Ferrand.

Por tiuj, kiuj volas scii pli pri sia lingvo, mi forte rekomendas ĉi tiun verkon.

**Don Harlow**

**Brown, Vinson:** *The Incredible Paradox / La nekredibla paradokso*. Trad. Darlene Evans. Happy Camp: Naturegraph Publishers, 1992. ISBN 0-87961-225-8. 63 p. Broŝurita. Ĉe ELNA: Kodo INC001, Prezo \$6.95 (nemembroj) / \$6.60 (membroj).

Mi ĝuis legi la novan bahaan libreton "La nekredible (tiel!) paradokso", verkita de Vinson Brown. Skribita en logika maniero, la libro prezentas la bahaan vidpunkton en facile komprenebla maniero. La originalo, kontrolite de la Bahaa Nacia Spirita Asembleo, estas aprobata baha publikigaĵo.

La Esperanta traduko farita de Darlene Evans estas en simpla usona stilo de Esperanto. Plaĉas al mi la formato de la libro, taŭga por nespertuloj: sur unu paĝo la angla teksto kaj sur la alia, la Esperanta. Se angleparolanto ne tuj komprenas la Esperantan tekston, tiu tuj povas kontroli la anglan originalon, ĉe l' alia paĝo. Jen bona ebleco plibonigi sian Esperanton.

Mi havas tamen malgrandajn sugestojn. Usonaj esperantistoj tro ofte uzas "la" kaj "ĉi". Se misuzataj ili malhelpas fluan legadon de la teksto. "La" en Esperanto montras specifan nomon aŭ aĵon. Estas multe da "the" en la angla lingvo, kaj usonaj tradukistoj ofte opinias, ke oni ĉiujn devas traduki en Esperanton. Ankaŭ la partiklon "ĉi" oni tro ofte kaj ne ĉiam ĝuste uzas. Mi ja volus scii ĉu la Esperanta versio estis kontrolita. La eraro en la titolo (nekredible anstataŭ nekredibla) estas neakceptebla.

Sed, ĉiukaze, la libro estas ĝinda kaj helpa al tiuj, kies Esperanta nivelo ankoraŭ ne estas tre alta.

**Cynthia Libby**



# VOLAS KORESPONDI

## Amikeco trans limoj

*Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri sangon inter linioj en adreso.*

### ALBANIO

**Shaban HASANI**, Laqjia nr. 6, Pallati 63, KUKES. 47-jara konstruata inĝeniero nun ĉefo de urba oficejo pri konstruado, telekomunikado kaj aŭtokomunikado, estro de Esperanto-Asocio en Kukës.

### POLLANDO

**Lukasz BARAN**, Gora Ropczycka 27, 39-120 SEDZISZOW MLP., woj. Rzeszow. 20-jara studanto en teknikumo, interesiĝas pri muziko, sporto, modernaj aŭtomobiloj,

geografio kaj kulturo de Usono, ŝatas ludi tablo-tenison.

### RUMANIO

**Adrian POPA**, Str. Rapsodie nr. 14 bl. P. sc. I et. II ap. 8, 3400 CLUJ-NAPOCA. 24-jara fraŭlo.

### RUSIO

**Nastja FJODOROVA**, 660020 KRASNOJARSK, ul. Igarskaja d 1a 3. 14-jara lemantino, interesiĝas pri kantistoj kaj vivo en Usono, kolektas kalendaretojn, glumarkojn, poŝtmarkojn, monerojn, maĉgumetojn, sonkasedojn.

**MAGOMEDOV Murad**, regiono Daŝnadaevskij, 368641 vilaĝo DIBGAŜI, Dagestano. 14-jara

lernanto en fizika-matematika liceo, interesiĝas pri sporto, ĉina gimnastiko, muziko kaj NIFOJ. Nesomera (lerneja) adreso: 367015 MAĤAĈ-KALA, ul. Aziza Alijezia pr. 4 domo N4. RFML, Dagestano.

**Irina BRUNOVA**, 660118 KRASNOJARSK, m-n Severnij, ul. Prospekt Komsomolskij d 18-65. 16-jara virino, kudras, brodas, desegnas, gimnastikas, kantas, dancas, ŝatas bestojn, florojn, kolektas pupojn, kalendaretojn, bildkartojn, glumarkojn, lernas skii.

**OZEROVA Eva**, Moskva regiono, OREĤOVO-ZUEVO 142601, Lenina 94-3. 16-jara fraŭlino, interesiĝas pri libroj, literaturo kaj historio alilandaj, kulturoj, kutimoj kaj vivo de diversaj popoloj, kolektas markojn kaj monerojn.

**Natalija MAKARENKOVA**, ul. Sofji Perovskoj 27-44, 183038 MURMANSK. 20-jara oficistino, tutmonde, interesiĝas pri literaturo, lingvoj, multaj aliaj, nepre respondos.

## Daŭrigata de paĝo 11

Mi ĵus tralegis la 1992(3)an numeron de *e/usa*. Interesis min la komentoj de Edveno Grobe, kvankam mi ne certas ĉu mi samopiniis pri la graveco de la "legitimigo" de E-o en "akademio" aŭ ne. La intervjuoj kun li k Ĝan Ŭesli Starling k.a. estas feliĉa ideo.

Kelkajn etajn erarojn mi jam rimarkis: vi ne aperigis mian nomon en la listo de korektantoj de FEC, kvankam mi certe estis iu el ili kiam mi skribis al vi la leteron kiun vi aperigis. Kompreneble nun estas pluraj aliaj homoj kiuj partoprenas. Mia retadreso ne aperas en la listo. La retadreso de Susan Bjorner aperas tie, tamen ŝia nomo k poŝtadreso NE aperas en la membrolisto. Letero [pri E-o en kosmonaŭtiko] aperas sub tiu rubriko subskribita de E.G. Mardon, A.A. Mardon, J.S. Williams, tamen neniu el ili aperas en la membrolisto.

Manko de adreso ĉe la subskribintoj de leteroj sub tiu rubriko ĝenas. Ekzemple vi komentas ke Johnny Curry povus en sia regiono aŭdi Radion Havana Kubo; nur per serĉo en la membrolisto mi komprenis ke li loĝas en Alabama.

Via plejŝatata sciencfikcia verkisto estas Poul Anderson, ĉu? Mi supozas ke Heinlein estis pli influhava en mia vivo; tamen mi legis multajn rakontojn k romanojn de Anderson, k lia *Orbit Unlimited* estis grava influo al mia decido studi ĉe St. John's College. Generale li instigis min lerni eŭropajn lingvojn. Tamen estis Ursula LeGuin kies *The Dispossessed* preparis min mense por la ideo de Esperanto... k la lingva ideo k la "interna ideo". Nu, kial ne motori al Orinda (nur ĉe la alia flanko de la montetoj, ĉu ne?) k plendi rekte al la katedro de la Dano (Ogier le Danois) mem pri lia malafabla komento pri E-o? (Kompreneble mi supozas ke estis la voĉo de Manse Everard aŭ simila protagonisto, k ne tiu de la verkisto mem...)

George W Partlow

[La listo de FEC-korektantoj venis el la revuo *esperanto* (nov. 1991) kaj verŝajne estis jam tiam eksmoda. Mi pardonpetas al tiuj, kies nomoj ne aperis (sendube pli ol vi sola). Adresojn de usonanoj mi kutime ellasas por konservi spacon. Kritiko pri la komento de s-ro Anderson estas jam (perletero) liverita kaj (laŭ lia kutimo) tre afable akceptita.]

## HAVEBLAS DENOVE ...

... la ĉi-sube listitaj libroj, kiuj mankis el nia stoko je la apero de la ĉi-jara librokatalogo de ELNA. Pli detalajn priskribojn pri ili vi trovos en antaŭaj librokatalogoj de ELNA kaj en la baldaŭ aperonta aldono al nia ĉi-jara librokatalogo.

**LA ARTO DE MEMDISCIPLINO: PSIKAGOGIO**, Charles BAUDOIN. 1926, 91p. broŝurita. Germanio. Kodo: ART002. Prezo: \$1.25 (nemembroj) / \$1.15 (membroj)

**FUNDAMENTO DE ESPERANTO**, L. L. ZAMENHOF. Deko eldono 1991, 353p. bindita. Italio. Kodo: FUN001. Prezo: \$17.75 (nemembroj) / \$16.85 (membroj)

**GERDA MALAPERIS!**, Claude PIRON. 48p. broŝurita. Brazilo. Kodo: GER001. Prezo: \$4.50 (nemembroj) / \$4.25 (membroj)

**GRAMATIKA DEMANDARO RESUMA**, Julio BAGHY. Kvina eldono 1989, 48p. broŝurita. Hungario. Kodo: GRA002. Prezo: \$5.25 (nemembroj) / \$5.00 (membroj)

**ILIKAPTIS ELZANI!**, Johano VALANO (pseŭd.). 1985, 103p. broŝurita. Brazilo. Kodo: ILI001. Prezo: \$11.00 (nemembroj) / \$10.45 (membroj)

**LA LUZIDOJ**, Camões. Trad. Leopoldo H. KNOEDT. 1980, 463p. bindita. Brazilo.

## Daŭrigota sur paĝo 16

## Daŭrigata de paĝo 12

stayed with Russian, previously required of all students.

In Poland, German, barely taught at all under Communist rule, now accounts for 30 percent of all foreign language instruction, the largest proportion of any foreign language, according to the Goethe Institute.

[From an article by Marc Fisher of the Washington Post, reprinted in the San Francisco Chronicle, Feb. 17, 1992; provided by Ionel Onet.]

[“To bash, v.t., origin unknown...”]

The problem with [Japanese] Prime Minister Miyazawa’s now infamous remark that Americans lack a work ethic is that he never said it. It was a mistranslation by the press that continues to fuel a dangerous surge of American hostility toward the Japanese.

Able to read some Japanese, I reviewed his remarks in the original. I showed them to translators. I checked translations and accounts from Japan’s most respected news organizations—the Asahi Shimbun newspaper and NHK TV—and from the Japanese Ministry of Foreign Affairs. The disputed remark came when he was speaking about a limited segment of the American

economy—the shift from producing goods to money manipulation such as leveraged buy-outs and junk bonds. Those who understand Japanese agree that a faithful translation of the much quoted remark is, “In this area, I have long thought that something like a work ethic may be lacking.”

For those who want to consult the key sentence, here is the literal translation: I in this area work ethic thing (subject-indicating particle) is lacking maybe long time have thought.

Reporters hungry for a hot story ... are especially prone to making mistakes on deadline in a foreign language.

[Quoted from an article by Charles Burrell, originally published in the Los Angeles Daily News; reprinted in the Oakland Tribune, Mar. 19, 1992.]

[The wild blue yonder.]

During a recent trip through the passport check and customs area at O’Hare Airport, I was appalled by the welcome Chicago’s only international airport provides foreign visitors.

First, unlike almost every foreign airport I’ve visited, signs at customs and border control are in only one language—English.

Second, few customs and immigration personnel speak a language other than

English. During my recent visit, one immigration worker was yelling at large masses of arriving passengers to line up according to their citizenship. Not only was she yelling at our international guests, but probably for many of the travelers she was speaking a language they didn’t understand.

[Quoted from a letter by Alan J. Shannon in the Chicago Tribune, Mar. 26, 1992; sent by Bern Wheel.]

## Daŭrigata de paĝo 16

Kodo: LUZ001. Prezo: \$29.50 (nemembroj) / \$28.00 (membroj)

**STEP BY STEP IN ESPERANTO**, Montague C. BUTLER. Naŭa eldono 1991, 281p. bindita. Usono. Kodo: STE001. Prezo: \$12.95 (nemembroj) / \$12.30 (membroj)

**WINNIE-LA-PU**, A. A. MILNE. Trad. Ivy KELLERMAN kaj Ralph A. LEWIN. Dua eldono 1992, 164p. bindita. Nederlando. Kodo: WIN001. Prezo: \$17.95 (nemembroj) / \$17.05 (membroj)

Bonvolu, mendante tiujn ĉi kaj aliajn varojn de ELNA, aldoni la poŝtajn kostojn (10% el la valoro de la menditaĵoj; minimume \$1.50, maksimume [nur por Usono] \$7.00), kaj se vi loĝas en Kalifornio ankaŭ la ĝustan vendimposton. Dankon!



President: Angela Harlow (1993), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187

Vice President: Dr. Grant Goodall (1993)

Secretary: Ellen Eddy (1995)

Treasurer: John B. Massey (1994)

Other Board Members: Dr. E. James Lieberman (1993), Sherry Wells (1993), David Wolff (1993), William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994), Thomas Eccardt (1995), D. Gary Grady (1995), Rochelle Grossman (1995)

Commissioners and Chairs: Don Coleman (Local Clubs, Nominating), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), David Gaines (Youth), Lucy Harmon (Travel Affairs, Instruction), Dorothy Holland-Kaup (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Science & Technology), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course), Sherry Wells (Publicity), David Wolff (Publishing)

Director, Central Office: Mike Donohoo

Vice-Director, Central Office: Ionel Onet

ELNA Archivist: Ionel Onet

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

### ELNA Dues for 1992

|                  |       |
|------------------|-------|
| Regular          | \$30  |
| Family           | \$45  |
| Youth (under 27) | \$15  |
| Limited income   | \$15  |
| Sustaining       | \$60  |
| Life             | \$600 |

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, “Friend of Esperanto,” has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

### UEA dues 1992

|                                |           |
|--------------------------------|-----------|
| Member-Guidebook only (MG)     | \$ 8.00   |
| Member-Yearbook only (MJ)      | \$18.00   |
| Member-Subscriber (MA)         | \$45.00   |
| Societo Zamenhof (additional)  | \$90.00   |
| Subscription only to Esperanto | \$27.00   |
| Subscription only to Kontakto  | \$14.00   |
| Life Membership in UEA         | \$1125.00 |

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

**MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND!** If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

**DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1992(6) of Esperanto U.S.A. is Sep. 25, 1992**

Esperanto U.S.A.  
Volume 28, No. 4  
ISSN 1056-0297

Esperanto League for North America, Inc.  
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530

Telephone: (510) 653-0998

For info: (800) 828-5944

Editor: Don Harlow

Telephone: (510) 222-0187

Compuserve: [72627,2647]

Internet: 72627.2647@compuserve.com